

N-ro 5

Novembro


1912

★ ESPERANTISTA ★
GAZETO
DANLANDO ★

Sub redakcio
de
ANDR. NISSEN




Eldonejo Esperantista
KOPENHAGO






Serio
de
Konataj Danaj Esperantistoj



Sro *F. Kyhse.*
(Kopenhago.)
Aŭkeidirektoro.
Prezidanto de
»Societo de Danaj
Esperantistoj«.



Sro *G. Hinricksen.*
(Kopenhago.)
Vieprezidanto de »C. D. E. L.«.
Prezidanto de
»Konversacia Esperantista
Klubo«.



Peresperanta studvojaĝo en Bohemujo kaj Moravio.

Dum tri semajnoj, fine de Septembro kaj komence de Oktobro, mi vojaĝis en Bohemujo kaj Moravio por studi ĉeĥajn lernejaferojn. Kiel Esperantisto kaj membro de U. E. A. mi kompreneble avertis samideanojn pri mia alveno al la diversaj urboj kaj vilaĝoj, kiujn mi vizitis, kaj tial mi ankaŭ havis bonan sukceson, kaj ĉie multaj gesamideanoj bonege min helpis. Ili min ricevis en la stacidomoj, min akompanis al lernejoj kaj donis al mi multajn valorajn sciigojn, eĉ multaj gekolegoj gasteme min invitis por loĝi ĉe ili, kaj tiamaniere Esperanto ankaŭ min helpis ekonomie.

Mi komencis mian studadon en Praha (Prago), la belega ĉefurbo de Bohemujo. Precipe mi havas kaŭzon danki la samideanojn srojn profesoron *Rosicky*, profesoron *Pitlik* kaj financan oficiston *Skrivánek*, kiuj min akompanis. Mi vizitis du belegajn lernejojn. Mi dezirus, ke ĉiu, kiu diras, ke ni oferas tro multe da mono pri lernejkonstruaĵoj, vidus ĉi tiujn lernejojn. Oni tute ne ŝparis, sed nur zorgis pri beleco kaj boneco, ĉar unu el ili estas vera palaco, sed alia estas pli bona interne. Estas grandaj lumaj koridoroj provizitaj kun belaj bildoj. Ankaŭ la ĉambro estas grandaj kaj lumaj, kaj apud ĉiu ĉambro estas kabineto por instruisto. Por ĉiu fako — naturhistorio, fiziko, desegnado kaj geografio-historio — estas kabineto kun ilaroj, kaj la instruadiloj estas tre bonaj. Bedaŭrinde mi ne ĉeestis instruadon en ĉi tiu moderna lernejo, ĉar oni ankoraŭ ne tute komencis post somera libertempo. En alia lernejo mi antaŭ mia forvojaĝo aŭdis bonan instruadon en ĉeĥa lingvo. Dum mia tritaga restado en Praha mi krom la lernejojn ankaŭ vidis multajn aliajn interesajn kaj belegajn konstruaĵojn, kaj ŝajnas al mi, ke Praha estas unu el la plej vizitindaj urboj, precipe kaŭze de la multaj, malnovaj, mezepokaj konstruaĵoj. Vojaĝu tien kaj vidu!

En vilaĝo *Sv. Dobrotivá* inter Praha kaj Plzen (Pilsen) mia multjara korespondanto sro instruisto *Bauer* min gasteme ricevis, kaj ĉe li kaj aliaj gekolegoj mi ĉeestis instruadon en diversaj fakoj. En vilaĝoj oni instruas preskaŭ tiom da horoj kaj en la samaj fakoj kiel en urboj, kaj ĉie mi trovis, ke la ĝeinstruistoj uzas la saman bonan instruadmetodon. Kiam estas multe da fabrikoj, ankaŭ en vilaĝoj, tie estas industriaj lernejoj. La kunestado kun gekolegoj kaj la impreso de la familia vivo estis por mi tre

DANLANDO

interesa. Ankaŭ kun la paroĥestro mi parolis, kaj li montris al mi preĝejon kaj monaĥejon kaj donacis al mi bildon kaj priskribon de ĉi tiuj. La rilato inter li kaj la instruistoj estis bona; sed plej ofte instruistoj kaj pastroj tute ne interpaciĝas; ofte ili eĉ procesas.

Dum vojaĝo al Ĉ. Budejovice (Budweiss) en suda Bohemujo mi restadis en vilaĝo Libomyšl, kie mi vizitis s^{ron} kolegon *Zadák* kaj ĉeestis instruadon en desegnado. Li kaj alia kolego bonvole donacis al mi multajn desegnaĵojn. En la ĉeĥaj lernejoj oni pli bone desegnas ol en la niaj. Desegnado ankaŭ estas unu el la ĉefaj fakoj, kaj oni al ĝi uzas multe da tempo; sed la rezultato ankaŭ estas bonega eĉ en vilaĝaj lernejoj.

Ĉ. Budejovice estas bela kaj sufiĉe granda urbo kaj havas precipe multe da bonaj lernejoj. Sroj fakinstruisto *Svacina* kaj ĉefleŭtenanto *Hollegcha* min ricevis kaj akompanis. En la burĝa lernejo mi vidis belajn desegnaĵojn kaj aŭdis bonan diversfakan instruadon. Mi admiras miajn ĉeĥajn gekolegojn pro la bona rezultato, kiun ili atingas, kvankam ili havas pli multajn lernantojn ĝis 80 en unu klaso — ol ni. Certe ilia firma metodo estas la ĉefa kaŭzo. En tiu ĉi urbo mi ankaŭ vizitis kelkajn privatajn lernejojn, kiuj estis tre interesaj. Ili estas fonditaj de naciaj societoj. La ŝtato ne volonte fondas pli multajn ĉeĥajn lernejojn ol absolute necese, kaj tial estas naciaj societoj, kiuj agas. Mi vizitis grandan muzikan lernejon, en kiu oni ankaŭ koncertas. Ĉeĥa popolo estas tre muziksentema. Estis ankaŭ bona komerca lernejo kaj knabina liceo, en kiu ankaŭ la lernantinoj havas loĝejon kaj nutraĵon. Proksime de la liceo estas granda virina industria lernejo, en kiu junulinoj lernas kudri, kuiri k. t. p. Estis tre interesa vidi, kiel la lernantinoj laboris. Specialan intereson por mi kiel instruisto havis la privata pedagogia instituto. Al la instituto ekzemple apartenas tre bona studĝardeno. La instruista edukado estas kvarjara. Oni fondis privatan seminarion, ĉar ministraro ne volis, dirante, ke la ĉeĥoj havas sufiĉe.

Krom societoj, kiuj fondas tiajn lernejojn en la urboj ankaŭ estas aliaj naciaj asocioj, kiuj fondas ordinarajn elementarajn lernejojn en komunumoj, kie la germanoj havas la potencon kaj ne konstruas ĉeĥajn lernejojn, tial precipe en la limregionoj. En Praha oni kun rajtigita fiereco rakontis, ke la urbestro en Praha konstruis lernejojn ankaŭ por germanoj, kvankam tio ne estas ĝia devo. La germanoj nur estas 7% de la loĝantoj. — Sed en Wien, kie estas 4—500,000 ĉeĥoj, 25% de la loĝantoj, tute ne

DANLANDO

estas publika ĉeha lernejo, kaj oni eĉ malhelpas ĉeĥojn, kiuj fondis privatajn lernejojn.

En Prostejov (Prossnitz) en Moravio precipe S^{ro} profesoro *Friedrich* min helpis, kaj li estas unu el la plej fervoraj Esperantistoj, kiun mi trovis. Mi vizitis la komercan akademion kaj ĉeestis instruadon pri germana korespondado ĉe samideano s^{ro} profesoro *Sprinc*. Estis tre interesa aŭdi, ke li kaj la lernantoj nur parolis germane dum instruado. Alia profesoro montris al mi modelan oficon, en kiu la lernantoj laboras memstare. Estas diversaj firmoj, ĉiu konsistante el 5 lernantoj, kiuj havas komercan rilaton. Ĉiu firmoĉefo estas responda pri sia firmo. Certe estas bonega ekzercado. — En la nova elementara kaj burĝa lernejo mi vidis belegajn desegnaĵojn. Ili ankaŭ estis en ekspozicio eksterlande. Kune kun s^{ro} *Friedrich* mi vizitis grandan fabrikan, kie estis esperanta oficisto.

De Prostejov mi vojaĝis al Olomouc (Olmütz), kie mi estis akompanata de diversaj samideanoj por vidi la belan urbon. Mia kolego s^{ro} *Neuzil* en Horka apud Olomouc min invitis al Horka kaj estis tre gastema. Li min akompanis al najbara vilaĝo Prikaz, en kiu estas tre bela nova vilaĝlernejo. S^{ro} *Neuzil* estis tre fervora instruisto, kaj kun ĝojo mi ĉeestis lian instruadon, precipe la desegnadon, kaj li donacis al mi multe da belaj kaj interesaj desegnaĵoj. Vespere membroj de „Sokol“ gimnastikis por mi, kaj tio estis por mi tre interesa. „Sokol“ signifas falko kaj estas la nomo de la naciaj gimnastikasocioj, kiuj estas en ĉiuj urboj kaj multaj vilaĝoj. En Praha mi vidis biografan prezentadon de la granda „Sokol-festo“ en Praha dum la somero 1912. Estis tre interesa kaj bela.

En Olomouc s^{ro} *Neuzil* min ankaŭ akompanis, kaj ni vizitis grandan privatan lernejon por virinoj. Estas kaj industria kaj komerca lernejo. La konstruaĵo estas tre bela kaj bonaranĝita. Ankaŭ tie ĉi instruistino, — kiu komencis lerni Esperanton, — afable montris al mi belajn desegnaĵojn. Ankaŭ ni vizitis realan lernejon kaj la ĉehan urbolernejon. La lernejestro, samideano s^{ro} *Augustin*, tre afable nin akompanis en la lernejo. Li tre bedaŭris, ke la lernejo ne estas bona kaj certe estas, ke ĉi tiu lernejo estas la plej malbona, kiun mi vidis. Estas malnova kaj tiel malluma, ke oni ofte devas lumigi ĝin dum la tuta tago. La germana urbestro ne volis konstrui novan ĉehan lernejon!

Mi havis la plezuron ĉeesti distriktajn instruistajn kunvenojn en Olomouc kaj en Bystrice, — la lasta urbo, kiun mi

vizitis en Moravio. En Esperanto mi respondis diversajn demandojn pri danaj instruistaj rilatoj, kaj esperantistaj kolegoj tradukis miajn respondojn. Ili bedaŭris nin danajn instruistojn, ĉar ni ankoraŭ ne havas pedagogian inspektadon sed pastran. Tute ne ili povis kompreni, ke ni devas instrui 36 horojn semajne kaj havas mallongan someran libertempon. Ili maksimume instruas 30 horojn, kaj plej ofte pli malmulte (17—26 (!)) kaj havas dumonatan libertempon. Ke ni ne povas postuli nian pension antaŭ nia 70a jaro ankaŭ surprizis ilin. ĉar ili povas havi pension, la tutan salajron, kiam ili havas 61—62 jarojn; sed ili ankaŭ antaŭpagas 3 % de la salajro por pensio. Reciproke ili envias nin pro tio, ke ni havas pli bonan salajron ol ili, kaj pro tio ke ni nur havas maksimume 36 lernantojn en unu klaso; ili devas havi ĝis 80! Instruistinoj havas tie la saman salajron kiel instruistoj sed ne havas permeson edziĝi; pro tio ili kompreneble envias danajn koleginojn. Inter aliaj demandoj ankaŭ tiu ĉi: „Ĉu vi ankaŭ diras al infanoj, ke Elias ĉieleniris sur fajra veturilo?“ En ĉeĥaj lernejoj estas la pastroj, kiuj instruas pri religio.

En Bystrice estas pli multe da esperantistaj gekolegoj, kaj ili konkuradis en gastemeco al mi. Ĉerte multe da danaj Esperantistoj memoris sron *Krumpholtz*, kiu en 1909 vojaĝis peresperante en nia lando. Ankaŭ sro *Cejka* certe estas konata kiel tre lerta Esperantisto de multaj danaj gesamideanoj. Plie mi nomas kaj dankas koleginojn Fraŭlinojn *Mináriková* kaj *Janalíková* kaj kolegon sron *Ulehla*. Ili kaj samideano sro poŝta oficisto *Ruzicka* bonege min helpis. En lernejoj mi ĉeestis bonegan instruadon en diversaj fakoj. Precipe min interesis desegnado, kaj sro *Ulehla* afable donacis al mi multe da belaj desegnaĵoj. Ankaŭ la instruado pri fiziko estis tre interesa, kaj mi havis la plezuron aŭdi la lernejdirektoron sron *Papezik* instrui en tiu ĉi fako. Mi vidis ke ankaŭ en la infana lernejo, oni instruas laŭ moderna principo pri germana lingvo, kalkulado k. t. p. En granda lignmebla fabriko kaj en vaksa fabriko mi ankaŭ vidis tre interesajn aferojn.

Ĉie mi partoprenis en esperantaj kunvenoj, kaj oni petis al mi saluti ĉiujn danajn gesamideanojn. En vilaĝo *Horka* kunvenis ankaŭ sufiĉe multe da loĝantoj neesperantistaj por aŭdi pri danaj rilatoj. Ankaŭ en nacia domo (*Beseda*) en *Bystrice* kaj en laborista domo ĉeestis kaj esperantaj kaj neesperantaj geviroj, kiuj tre fervore demandis pri danaj rilatoj, ĉar por nia lando la Ĉeĥoj havas grandan intereson.

La ĉefa impresio, kiun mi ricevis de la ĉeĥa instruado, estis

DANLANDO

tre bona. Ŝajnas al mi, ke oni tie ordinare instruas pli bone ol ĉi tie kaj atingas pli bonajn rezultatojn, precipe en desegnado. La sola fako, kiu estas pli bona ĉe ni, estas gimnastiko. En tiu ĉi fako ni havas la plej bonan metodon laŭ nia nova gimnastika sistemo. Ankaŭ ŝajnas al mi, ke la higienaj rilatoj ofte ne estas bonaj. Nur malofte oni havas bonan ludplacon por infanoj dum libertempo inter la instruadhoroj. Ili devas resti en koridoroj kaj ĉambroj. Kaj oni plie ne havas specialan vestejon, sed havas vestaĵojn en la ĉambroj, en kiuj oni ankaŭ manĝas. Ankaŭ la kutimo havi necesejon en konstruaĵo por instruado ne estas bona, se ne estas akva necesejo.

La ĉeĥa popolo estis subpremita en kaj post „la tridekjara batalado“. Ĝi longe dormis kaj toleris la subpremantojn, sed vekigis, precipe post la jaro 1848, forĵetis la jugon, kaj nun ĝi estas libera, sed ĝi ankoraŭ ne havas tute aŭtonomion. En Praha mi vidis la belan novan monumonton de *Palacky*, granda ĉeĥa historiisto kaj politikisto, kiun oni nomis la patro de la bohema nacio. Oni vidas lin sidantan, kaj ankaŭ estas alegoriaj figuroj, kiuj prezentas la dormantan, la subprematan kaj la ekvekiĝantan nacion. La tuta monumento faras neforgeseblan impreson, precipe kiam oni ekkonaŝ la ĉeĥojn kaj lernas, ke ili nun estas fieraj je ilia nacio kaj laboras por fari tiun ĉi tiel klera kiel eble, ĉar ili estas tre progresemaĵ.

Kolding, 1—XI—1912.

P. Zoffmann,
Instruisto.



La Revuo

komencis publikigi tre interesan fakon „Internacia Vivo“; la artikoloj estas resumoj laŭ la grava revuo „La Vie Internationale“, eldonita de „Centra Oficejo de la Internaciaj Asocioj“ en Bruselo, fondita de Sroj *P. Otlet* kaj senatano *Lafontaine*, prezidanto de la „Propaca Oficejo“ en Bern. La „C. O. de I. A.“ ĉiutage fariĝas pli kaj pli grava, ĝi ricevas diversajn subvenciojn ĉiujare, i. a. de la belga ŝtato kaj de Sro Carneggie, tiel ke ĝia funkciado nun estas certigita.

Sroj *Otlet* kaj *Lafontaine*, kies granda simpatio al Esperanto ja estas bone konata, bonvolis interkonsenti pri kontrakto inter „C.

O. de I. A.“ kaj „La Revuo“, tiel ke la lastnomita havas ekskluzivan rajton traduki kaj reprodukti en Esperanto la artikolojn aperintajn en „La Vie Internationale“.

Ni kore gratulas la ŝatatan „Revuon“ pro la bona aranĝo.

Andr. Nissen.

Nia Lando

„Societo de Danaj Esperantistoj“. Ĉe la propagandkunveno la 24^{an} de Oktobro S^{ro} *Baruël* faris paroladon pri Esperanto. Post sprita enkondukanta paroladeto pri la historio kaj celo de la lingvo, li lerte donis al la ĉeestantoj malgrandan kurson en Esperanto per helpo de ok murtabuloj de „Møller & Borel“. Certe miris la aŭskultantaro sciigante kiel facile lernebla estas la lingvo Esperanto. Post la parolado sekvis koncerteto, kaj la ĉeestantoj ĝojis per la bela kanto de *Finoj Kühse* kaj *Melchior* kaj per la bonega muziko de *Fino Bjarnow* kaj S^{ro} *Georg Jespersen*.

Jaŭdon la 28^{an} de Oktobro faris nia fervora samideaino *Fino Agnes Melchior* tre interesan kaj belegan paroladon pri „La blinduloj kaj Esperanto“. Multaj personoj, inter kiuj ni vidis kelkajn gazetarrepresentantojn, ĉeestis kaj aŭskultis kun granda intereso la klerigan kaj elegante ellaboritan paroladon, kiun preskaŭ ĉiuj kopenhagaj gazetoj priparolis je la venonta tago. Speciale ni devas nomi „Vort Land“ („Nia Patrujo“), kiu enhavis grandan kaj afablan artikolon.

Aarhus. Dimanĉon la 24 de Novembro okazis festa kunveno de „Konversacia Klubo de Aarhus“ en la konstuaĵo de la metiistasocio. Kapitano *Aae* el Horsens faris interesan paroladon pri sia partopreno en la mondkongreso en Krakovo; kaj poste oni ĉe la komuna kafotrinkado kantis 3 humorajajn kantojn, verkitaj por la kunveno de 2 el la klubanoj. Krom kap. *Aae* partoprenis 2 aliaj esperantistoj de Horsens kaj de Aarhus kelkaj novaj anoj de nia movado.

Vejle. Jaŭdon la 24 de Oktobro la *Idistoj* ĉi tie aranĝis paroladon en la urbdomo pri *Ido*. Nur malmultaj personoj ĉeestis la paroladon, farita de la Sinjoroj adjunkto *R. Olesen*, *Vejle* kaj *Dr. phil.*

DANLANDO

Forchhammer, Fredericia. En la sekvanta diskutado partoprenis la ĉiam preta Sro kapitano *Aae*, Horsens, kiun nia klubo alvokis por kontraŭbatali Sron *Forchhammer*, de kiu li ja estas bonkonata. La enhavo de la paroladon montris nenian novaĵon, kaj por Sro *Aae* ne estis malfacile pruvi, ke *Ido* ne havas ekzistrajton kaj ke Esperanto malgraŭ la insistoj de la *Idistoj* estas pli facile lernebla ol *Ido*, kaj jam montris efektive sian uzeblecon en ĉiu direkto.

Al al insisto de Sro *Aae*, ke li ĝis nun neniam aŭdis *Idiston* paroli la lingvon, Sro *Forchhammer* respondis je fari mallongan paroladon en *Ido*, kio tamen tute ne povis fari al la aŭdantaro bonan impreson pri la belsoneco de la lingvo „*Ido*“ — kontraŭe!

Esperanto Unuiĝo de Danaj Instruistoj. Ĝenerala kunveno okazis je la 23. Nov. en „Grundtvigs Hus“. La prezidanto, Firo *Asta Mikelsen*, raportis pri la pasinta jaro, kiu estas la unua vivjaro de la unuiĝo. De modesta komenco la juna unuiĝo bonege kreskis kaj sukcesis firmigi sian ekziston. Malgraŭ la malalta kotizo, la unuiĝo elsendis multajn propagandilojn kaj tiamaniere faris bonan propagandon dank' al la malŝparemo de kelkaj el la membroj. La kasisto, Sro *Beyerholm* prezentis la kalkuladon, kiu estis unuvoĉe akceptata. Nova estrarmembro, Sro Vicinspektoro *Magnussen*, estis elektata anstataŭ Sro *Kempf* kaj anstataŭ Sro cand. mag. N. C. *Carlsen*, Odense. estis elektata Sro *Moesgaard*, Køge. La aliaj estrarmembroj estis reelektataj.

Kloden rundt

Kiew. Som et Resultat af *Parrish'* Besøg i denne By kan nævnes, at den derværende Esp.-Forening har faaet gratis Lokaler i *Nathansons Handelsskole*. Herr N., der er bleven stærkt interesseret for Esp., har stillet 7 (!) store Lokaler til Foreningens Disposition daglig.

Saratow. Et nyt Blad »*Volga Stelo*« udkommer her paa Russisk og gør god Propaganda blandt „Ikke-Esperantister“. Esp. har forøvrigt i denne By faaet Fodfæste i Gymnasierne og paa Universitetet.

Kowno. I fire af Handelsskolens Klasser er paabegyndt Esperantoundervisning, ledet af Toldinspektør *Bickow*.

Lodz. I den senere Tid vinder Esp. stadig større og større Fremgang her. Eleverne i det derværende private Gymnasium modtager for Tiden Undervisning i Sproget.

St. Petersborg. Marineministeriet har officielt meddelt Herr *A. M. Nedosivin*, at man for Fremtiden med Tak modtager enhver Meddelelse om „Esp. og Marineaffærer“. Herr *N.* har i den Anledning en detailleret Rapport under Udarbejdelse.

Lübeck. Seminarieførstander Dr. *Mölbuz* underviser for Tiden 11 Lærere og 3 Lærerinder i Esperanto.

Siberien. I Tomsk findes en Esperantoforening, som tæller 200 Medlemmer, og som for Tiden har et Kursus i Gang, hvori deltager 44 Personer.

Persien. Esp. Foreningen i Tabris har paa Gaderne opslaaet Plakater om Esperanto paa Persisk og Arabisk. I den armenske Skole „Aramjan“ deltager 70 Elever i Esp.-Kursus.

Røde Kors. Cirkulærer om „Esperanto og Røde Kors“ er bleven udsendt af Viceadmiral *Bayle* samt Generalerne *Sebert* og *Prion*; sidstnævnte er Præsident for Fransk-Esp. Røde Kors. Præsidenten for det portugisiske R.-K. har som Tak sendt General *Prion* „Røde-Kors-Føreren“ paa Portugisisk, ledsaget af et Brev, hvori han fortæller, at det portugisiske R.-K. har ladet udgive 10,000 Førere paa Esperanto.

Fra Centralkomiteen for det japanske R.-K. har General *Sebert* modtaget Takskrivelse for Esp.-Cirkulærer.


Tyrkisk R.-K. har anbefalet Ambulancisterne at lære fremmede Sprog, særlig Fransk og Esperanto.

Det østrigske Krigsministerium har henledet Officerernes Opmærksomhed paa Esperantos Nødvendighed. Militærbladet „Die Vedette“ (Wien) har for nylig bragt en Oversættelse af Kaptajn *Bayols* (Frankrig) Artikel: „Esperanto, Hjælpeprog for Militære“.

Finland. I Foraaret gæstede en finsk Lærerinde, Frøken *Lönberg* fra Borgaa, København, hun kom for at gøre sig bekendt

DANLANDO

med vort Skolevæsen. Da hun er Esperantist, henvendte hun sig selvfølgelig til „Danske Læreres Esp.-Forening“ som gav hende alle mulige Oplysninger. Da Frk. L. rejste paa Stipendium maatte hun ved sin Hjemkomst aflægge Beretning til Autoriteterne, hun glemte ikke at omtale den Hjælp Foreningen havde ydet hende, ligesom hun fremhævede, at hun uden Esperanto vilde have følt sig meget hjælpeløs baade her og i Stockholm, hvor hun først havde været. Hun har for vor Sag et godt Resultat at melde, idet hun har faaet Lov til at undervise hele sin Klasse (4 a) i Esperanto, Klassen tæller 24 Elever — 11 Dreng og 13 Piger.



Bibliografio.

Historio de la Lingvo Esperanto de *Edmond Privat*. (Unua parto 1887—1900) Universala Esperantia Librejo, 10 Rue de la Bourse, Genève. Prezo Sm. 0 50.

Ĉi tiu libro preskaŭ ne bezonas rekomendon, ĝi rekomendas sin mem. En 12 ĉapitroj la eminenta verkisto tre interese rakontas pri: 1. Esperanto kaj indo-eŭropaj lingvoj. 2. La Esp. vortaro. 3. Zamenhof, Deveno de Esperanto. 4. Aperoj de la unua libro. 5. Unua jaro „la dua libro“. 6. Amerika Filozofia Societo kaj „Aldono al la dua libro“. 7. Nürnberg, Einstein. „La Esperantisto“. 8. La Ligo, reforma agitado. 9. „Lingvo Internacia“ en Upsala. 10. Franca Societo „l'Esperantista“. 11. La influo de L. de Beaufront. 12. Esperanto en Ruslando. Interna Ideo. La spirito de la lingvo.

La tabelo de enhavo certe suficas por instigi la legantojn al aĉetado de la libro. Ni nur aldonas, ke kono de la historio de l'lingvo estas treega necesa.

Titolaro de Esperantaj Verkoj tradukitaj el la Rusa Literaturo. Antaŭparolo de *B. Kolzin*. Eldonis „Esperanta Biblioteko de *Georg Davidov* en Saratov“. Librejo „Esperanto“ Tverskaja, 26 Moskvo, ankaŭ havebla ĉe la aŭtoro *Georg Davidov*, Postkesto, 12 Saratov. Ruslando. Prezo 10 kop.

G. Davidov, kiu posedas la plej grandan bibliotekon de Esperanto, jam elsendis katalogon pri sia biblioteko. Kvankam la katalogo estas tre ampleksa verko (130 paĝoj) ĝi ne enhavas titolaron

de tradukaĵoj, presitaj en diversaj Esp.-gazetoj. Tial Sro Davidov nun eldonas kompletan registron de „Rusa literaturo en Esperanto“, ne sole beletristikaj sed ankaŭ ĉiutemaj verkoj, sciencaj, socialaj k. t. p. Entute la listo enhavas 651 tradukojn.

Estus tre bone, se ĉiuj landoj eldonas similajn katalogojn, tiamaniere oni evitas duoblan tradukon de la samaj verkoj.

Los Angeles (Kalifornio); la urbo kaj la graflanda, 64-paĝa gvidlibro kun multaj ilustraĵoj. — Eldonita kaj kontraŭ unu internacia respondkupono dissendata de la Komerca Ĉambro en Los Angeles (Kalifornio).

Neniu samideano preterlasu, haviĝi al si ĉi tiun belan libreton. La Komerca Ĉambro en Los Angeles devas esti konvinkota pri tio, ke ekzistas granda anaro da esperantistoj, kiu per la famaj paroladoj de Sro Parrish estas atentigita pri la belaj urbo Los Angeles kaj lando Kalifornio.



Horsens.

Jam en la dekunua jarcento Horsens estis grava urbo, kaj hodiaŭ ĝi estas, laŭ nombro de loĝantoj (25,000), la kvina en Danujo). Ĝi estas progresema urbo kun vigla komerco kaj diversfaka industrio ĉiam kreskantaj. Tial, kiel ankaŭ pro fajregoj kaj rabadoj de malamikaj militistaroj dum pasintaj jarcentoj, ĝi havas, malgraŭ sia maljuneco, sufiĉe modernan aspekton: la surstrataj domoj preskaŭ ĉiuj estas pli aŭ malpli novaj, kaj malnovajn oni nur trovas en la kortoj, kie ili servas kiel komercaj provizejoj.

La belaj stratoj de Horsens, kiuj kune kun la punejo ĉefe famigis la urbon, estas larĝaj, rektaj kaj bone pavimitaj. Multnombraj grandaj elektraĵlampoj ilin hele lumigas, kaj ĉiam pligrandiĝanta nombro da grandegaj butikfenestroj ilin gajigas per sia malŝparema iluminado kaj siaj allogaj ekspozicioj. Vigla konkurado inter la komercistoj ilin instigas al klopodoj por superi unu la alian en tiu rilato; ĉie oni forhakas la malsupran parton de la domoj ĝin anstataŭante per spegulvitraĵoj de miriga larĝeco. Belaj,

DANLANDO

grandaj domoj enhavantaj tiajn modernajn butikojn elkreskas grandnombre en la ekstremajoj de la urbo kaj eĉ en malmulte trapasataj stratoj anstataŭas malnovajn konstruaĵojn. Preskaŭ ĉiuj komercaj kaj industriaj firmoj rapide vastiĝas, kaj jam tri el ili estas Esperantiaj Entreprenoj*).

Sur alta loko en la nordokcidenta ekstremaĵo de la urbo, de malproksime videbla staras la landfama punejo de Horsens. Tiu ĉi grandega kaj bela malliberejo estas konstruita en 1853 kaj povas loĝigi 500 virajn krimulojn. Jam post tri jaroj ĝi estis plene okupata, kaj oni estis devigata ĝin pli grandigi. Malgraŭ tio ĝi bedaŭrinde ĉiam restas plena. Evidente niaj krimuloj ĉiuj deziras loĝi en tiu bela domo — same kiel la prusa generalo Falkenstein, kiu, alveninte al Horsens dum la milito en 1864 kaj admirante la kastelsimilan konstruaĵon, ekkriis: „Tio estos mia loĝejo“.

La kreskado de komerca vivo en Horsens necesigis antaŭ kvar jaroj gravan pligrandigon de ĝia haveno kaj poste pliprofundigon de la ŝipkanalo tra la fjordo nun ebliganta la alvenon de ŝipoj de sep metroj da enakviĝo. Por faciligi la trafikon de kaj al la pligrandigota haveno oni estis pleniginta antaŭ ok jaroj brakon de la Bygholma rivereto, kiu trakuras la urbon verŝantan ĝian akvon en la havenon, de kiu ĝi estis ĝis tiam parto tamen uzebla nur por ŝipetoj. La plenigita rivereto transformiĝis en larĝa kaj bela bulvardo, meze ornamita per ĝardenetoj.

Grava fonto al la vigla Horsensa komerco estas ĝia riĉa kaj popolplena ĉirkaŭlando, kiun interligas al la urbo ne malpli ol kvar lokaj fervojoj, el kiuj unu kondukas al la bela marbanejo Juelsminde, alia sur la vastan erikejon, kies belegaj pejzaĝoj estas tre similaj al tiu de la nacia parko en la montetaro de Ræbild. Kun la najbaraj insuloj ĉiutagan komunikon efektivas tri vaporŝipoj.

Horsens estas tre riĉa je bonfarantaj institucioj, el kiuj kelkaj donacas al siaj protektatoj eĉ ĉiajn vivbezonaĵojn. Dum tiu ĉi jaro estas konstruitaj komforta kaj tute moderna „Hejmo de gemaljunuloj“ kaj la „Azilo de fraŭlino Kragh“; tiu lasta, ĉarme lokita estas eble la plej bela konstruaĵo de la urbo kaj donas al grandnombre da gemaljunuloj tute senpage plej dezirindan hejmon konforme al la lasta volo de sia imitinda fondintino.

*) nome: *Emil Møller*: fabriko de telefoniloj.

Paasch & Larsen, Petersen: fabriko de laktejmasinoj.

Hvamper & Jørgensen: fabriko de motoroj.

DANLANDO

Alvenante marvoje al Horsens oni nepre rimarkas la grandegan, novan, komunuman hospitalon, kiu starante sur deklivaĵo de la norda marbordo formas, kun siaj diversaj belaj konstruaĵoj, kvazaŭ tutan urbeton, kaj poste, ĉe la haveno mem, alian belan domegon, kiu estas la nova, limimpostejo. Inter la urbo kaj la hospitalo troviĝas la ĉarma „Arbareto de Karolino Amalio“, vasta, publika



La haveno.

parko, en kiu la pasintan 2^{an} de junio okazis tri sukcesa festo, kaŭze de la 25-jara jubileo de la internacia lingvo.

Kiel jam dirita Horsens ne estas speciale riĉa je antikvaj konstruaĵoj. El tiaj kontraŭstaris senkompatajn tempojn nur la du ĉefaj preĝejoj: tiu de „Nia Savinto“ kaj la „Monaĥeja Preĝejo“. Tiu ĉi lasta estas nepre vizitinda pro sia ĉarme ornamita interno, ĉiam konservanta la karakteron de riĉa, katolika preĝejo, kun amaso da artaj, lignaj skulptaĵoj, parte orumitaj. Ĝia plej bela tiuspeca artaĵo, mirinde skulptita predikejo el nigra kverkaĵo,

DANLANDO

tamen de multaj jaroj ornamas la preĝejon de „Nia Savinto“ starantan sur la ĉefa placo. Kvankam tiu ĉi preĝejo datumas de ankoraŭ pli malproksima, eĉ nekonata, epoko, ĝi ne havas tiel antikvan aspekton. Per sia simpla, serioza, iom severa arĥitekturo kaj masiva, alta turo ĝi faras preskaŭ imponantan impreson.

Sur la ĉefa placo ankaŭ staras sufiĉe ordinara domo, en kiu nun estas restoracio kaj kinematografa teatro. Ĉi tiu domo tamen estas la tiel nomata palaco, kie loĝis ĝis 1829 la kortego de Horsens. En ĝi vivis ĝis 1807 kvar ekzilitaj rusaj geimperiestridoj kaj poste la gaja patrino de Frederiko VII post sia eksedziĝo.



Bryrup Langsø.

Sur la plej malnovaj, ĉirkaŭ ducentjaraj domoj troviĝas enskribaj aĵoj plej ofte skulptitaj en la superpordegan trabon. Tiujn versaĵetojn — ĉar la plej multaj estas poeziaj — nia konata samideano Sro *Hejlskov* en Aarhus detale kaj plene pritraktas en libreto de li eldonita antaŭ du jaroj. Multaj el ili estas tute amuzaj pro sia naiveco kaj malbona ortografio, aliaj estas verkitaj latinlingve, evidente de kleruloj.

Belan sidejon Horsens havas apud samnoma fjordo, kiun protektas la duoninsulo Gyllingnæs kaj insuloj Alrø kaj Hjarnø donante al ĝi karakteron de enlanda lago, longa je 13 km. kaj larĝa je 2—4 km. Norden de la fjordo larĝa markolo kondukas en lagon (longa je 3 km. kaj larĝa je 1/2 km.) ricevantan

la alfluon de Hansted rivereto. Tiu ĉi lago, bone kaŝita pro la alteco de siaj ĉirkaŭaĵoj kaj pro la mallarĝeco de la enirejo, en pasintaj tempoj estis ŝatata rifuĝejo de marrabistoj. Tion divenigas longaj, interkomunikantaj tuneloj, elforsitaj en la krutaĵojn proksime ĉe la iama sip-ankrumejo kaj trovitaj nur antaŭ malmultaj jaroj.

Sur ambaŭ bordoj de la fiŝriĉa fjordo staras la belaj arbaroj de Stensballegaard (norde) kaj Boller (sude). En la lastnomita troviĝas la historia kastelo de Boller datumante de la tempo de grafo *Geert*, poste apartenanta i. a. al la bopatrino de Kristiano IV kaj al lia eksedzino *Kirstine Munk*, kiu tie loĝis dum 28 jaroj ĝis sia morto. Depost 1760 Boller apartenas al la graflando Frijsenborg. Al la nuna posedanto de tiu ĉi ankaŭ apartenas Stensballegaard, konata pro sia bela parko kaj pro tio, ke ĝi iam estis posedaĵo kaj sidejo de la filino kaj sola infano de nia fama ĉefkanceliero *Griffenfeldt*, kiu tie estis pasigonta siajn lastajn tagojn, post kiam li estis liberigita en 1698 post 23-jara mallibereco en Trondhjem. Li tamen pro malsaneco estis malhelpata forlasi la lokon de sia longedaŭra mizero kaj tie li mortis la sekvantan jaron. Sed al la preĝejo de Vær, staranta ĉe belega lageto malproksime de Stensballegaard, la korpon de sia malfeliĉa patro venigis la baronino *Kragh*, kaj tie hodiaŭ ripozas la bone konservitaj restaĵoj de la fama politikisto, kiel ankaŭ tiuj de lia edzino kaj filino. Bela arĝenta plato sur lia ĉerko rakontas la historion de lia gloro kaj posta, maljuste severa sorto. Super la enirejo de la kapelo staras: „Ĉi tie ripozas Griffenfeldt, kaj ĉi tie danan spiriton honoras la posteularo“.

Kiam antaŭ dek jaroj la ĉerko de Griffenfeldt bezonis riparon, mi havis okazon lin vidi, kaj apenaŭ mi povis kredi, ke jam pli ol du jarcentojn li estas malviva: tre precize mi povis admiri la inteligentajn trajtojn de senbarba vizaĝo kun agla nazo — iom simila al la mumio de Ramzes II — bonforman kapon ankoraŭ parte kovris malriĉa hararo, kaj sur la brusto ripozis interplektite la malgrasaj manoj de eleganta kortegano ĉirkaŭprenante bukedon da diantoj. Tiuj ĉi floroj kiel ankaŭ la arta prizorgo por la konservado de la korpo sendube atestas ne nur pri filina amo kaj kompato sed ankaŭ pri konfido, ke historio estu al la mortinto pli justa ol liaj juĝistoj, kaj ke venontaj generacioj redonu al li la honoron meritan. Kaj vere: starante en la ripozejo de la iama potenculo neeviteble oni faras komparon inter la sorto de tiu ĉi reĝa konsilanto kaj la juĝo elparolita de la regna juĝistaro


DANLANDO

antaŭ du jaroj al du aliaj reĝaj konsilantoj, kaj devige oni demandas sin, ĉu ne justeco tro multe sanĝiĝis dum la pasintaj du jarcentoj.

Norde de Horsens, malproksime je 5 km. en belega, tipe dana pejzaĝo troviĝas la ĉarma lago de Egebjerg kaj artezaj putoj sufiĉege provizantaj la urbon je bonega akvo. Tiu ĉi senkompara loko kun bela arbaro, herbkovritaj krutaĵoj kaj rava ĉirkaŭvidaĵo, ĉiam pli kaj pli estas ŝatata de la Horsensanoj kiel celo de iliaj ekskursoj.

Sed la malgranda spaco malpermesas al mi daŭrigi mian priskribon de Horsensaj allogaĵoj. Mi finas citante inter tiaj ankoraŭ nur: nian novan, stilplenan teatron (kun horizontala scenejo), la ĉarmplenan parkon de Bygholm (tute proksime ĉe la urbo), la domegon kaj ĝardenon de la Metiist- og Industriasocio, kiuj estas tre vidindaj. Kaj lasante al la vizitonto la trovon de ceteraj vidindaĵoj de Horsens mi fine nur rimarkigas, ke inter la famuloj, kies lulilo staris tie, troviĝas la ĉefepiskopo *Hans Svane*, generalo *Løvenørn*, admiralo *Vitus Bering*, sekretkonsilanto *Ove Høegh Guldberg* kaj la poeto *Herman Bang*.

Svend Aae.



Ĝardeno de l'metiist- kaj industriasocio.

Hotel-Adresaro.

Odense, Hotel Ansgar.

Biskvitoj kaj **Mielkukoj**

Bona biskvito, mastraja biskvito, sekala biskvito kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de
F. Holle,
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas **senpage** (se la provizo sufiĉas) paketon kun unu el la tri artikoloj.

Ilustrita **Gvidlibro** **pri Vejle**

havebla ĉe

Eldonejo Esperantista
Strandgade 11,
Kopenhago.

==== *Prezo: 35 Øre* ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

Bastonoj kaj Ombrloj
- - - je ĉiuj prezoj - - -

Telefon 8610.

Telefon 8610.

Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

Bredgade 35, København.
(Kopenhago)

Bela poŝa ŝtampilo (la emblem-
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

Ŝtampilo: (la verda stelo). Nur:
35 Øre (25 sd.).

Kuseno: 35 Øre (25 sd.).

:: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,
poŝtkartoj, silkflaĝetoj, propagand-
iloj, k. t. p.



AMATOROJ!

Aĉetu viajn
fotografajn bezonaĵojn ĉe


MIMOSA

Kopenhago,
Niels Hemmingsensgade 2.



Redakcio kaj Administracio: Strandgade 11, Kopenhago.
Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.

C. M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-
aĵo de konataj
danaj artistoj en
plejgranda elekto.

Ŝirmfornoj
tre elegante
nikelumitaj.

Kuirfornoj, kaj iz-
ole starantaj kaj
por enmurigo kiel ankaŭ
por hoteloj. Ĉiu speco de
fandajkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej
bona fabrikaĵo.**



Alt

Bogtryk

hurtigst
billigst

**Harald Jensens
Bogtrykkeri**

Admiralgade 24
Tlf. 5199